



## PILO-PRESS

Internacia Inform servo

Nürnberg, 12 dec 1973

Aperas ĉiusemajne

Informado kostas monon!

Subtenu la informantojn!

Abonu PILO-PRESS  
kaj END

Aĉetu Esperanto-  
Librojn!

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pöckel  
Postfach 2113  
D-85 Nürnberg 2  
Tel. (0911) 46 36 49; 5142 69

### Tezoj pri la germana lingvopolitiko

Paderborn(pp) Prof. D-ro Helmar Frank, direktoro de la instituto por kibernetika pedagogiko, antaŭ nelonge elpaŝis per studo pri la germana lingvopolitiko. Tiu studo kontribuu por malhelpi, ke la lingvopolitiko de la federacia registaro konduku al ŝovinismo kaj per tio endanĝerigu la politikan unuigon de Eŭropo. El politika vidpunkto ne eblas postuli, ke la anoj de kvin el la ses en la Eŭropa Komuno reprezentitaj lingvokomunoj lernu la lingvon de la sesa grupo; el pedagogia vidpunkto maleble estas, ke ĉiu eŭropano aldone al sia gepatra lingvo ellernu ĉiujn kvin aliajn literaturlingvojn de la Eŭropa Komuno. Kiel tre racian elirvojon prof. Helmar Frank rigardas la enkondukon de facile lerneblaj neŭtralaj interkompreniloj (ekz. Esperanto)

La studo de prof. d-ro Helmar Frank jam vekis interesigon ĉe kelkaj oficialaj rondoj en FRG kaj ankaŭ inter esperantistoj. Hodiaŭ ni volas publikigi komentojn pri la studo el la plumo de d-ro Hans Kasselmann, docento pri matematiko kaj gvidanto de la nova laborrondo Esperanto kaj Interlingvistiko ĉe la Universitato Paderborn.

D-ro Kasselmann skribas i.a.: "Ni esperantistoj havas multajn motivojn kaj pravigojn por nia lingvo Esperanto. Sed se ni volas pruvi la multajn avantaĝojn de Esperanto, multaj homoj tamen restas ĉe siaj antaŭjuĝoj. Kial? Ekzistas sendube multaj kialoj! Unu - mi pensas ke la plej ofta kaj grava - estas la jena: Se ni esperantistoj volas konvinki aliajn, multaj verŝajne pensas, konscie aŭ nekonscie: 'La esperantistoj ja nur deziras Esperanton tial, ĉar ili jam scipovas tiun lingvon; kaj mi ankoraŭ devas ĝin lerni; mi scipovas la anglan (eble ankaŭ la francan). Se Esperanto plivastigus, miaj anglaj scioj ktp. malplivalidus. Esperanto estas malavantaĝo por mi.' Tiel aŭ simile oni pensas.

Certe mi iomete troigis aŭ simpligis la aferon. Ĉu iu homo tre volonte lasas de si forpreni monon? Sendube ne! Same neniu tre volonte ŝatas, ke oni malgrandigas lian spiritan potencon kaj posedaĵon. Pro tiuj kaj aliaj kaŭzoj estas ofte pli bone uzi malrektajn motivojn por Esperanto kaj ke neesperantistoj disvastigu ilin. Tial estas bone, se ekzemple nia germana lingvo kaj ĝia rikolto aperu kiel ĉefafero, kaj apude kelkaj aŭ multaj argumentoj pledu por Esperanto.

Pro tio la studo de prof. Helmar Frank estas tiel valora, ĉar la germanan lingvon ĉiu ŝatas. La argumentoj, ĉefe celantaj al la germana, atingas la spiriton de ĉiu, kvankam ili fine estas argumentoj por Esperanto. - La argumentoj batalantaj nur por Esperanto ofte estas reĵetataj de antaŭjuĝoj, do restas sen efiko. Kiu facile lasas detrui sian komplikitan penssistemon per tiaj simplaj argumentoj de la esperantistoj kun tiaj revoluciaj konsekvencoj? Eble nur matematikistoj, tiuj strangaj homoj....-

Nu, kun la studo de prof. Frank ni instigu ankaŭ aliajn scienculojn kaj politikistojn verki similan artikolon aŭ skribi komenton. Estas bone havi valoran artikolon ne nur de FDP-ano, sed ankaŭ de anoj de aliaj partioj."

Nota: La studo de prof. D-ro Frank momente nur ekzistas kiel manuskripto.\*Interesuloj povas ricevi fotokopion kontraŭ 4,- GM ĉe Pilo-Press (faktaj kostoj por fotado kaj sendado!)

\* en germana lingvo

## Willy Brandt pri Esperanto

Bonn/Hagen (pp) En letero de la 6a de decembro 1973 la oficejo de la federacia kanceliero Willy Brandt skribis al s-ro Peter Hermanns, estro de la Fervojista Esperanto-Grupo Hagen jenan opinion de la kanceliero pri Esperanto:

"Komisie de la sinjero federacia kanceliero mi dankas pro via letero de la 14 nov 1973, per kiu vi alparolis la lingvoproblemon en la estonta Eŭropa Unio.

Vi povas esti certa, ke la federacia kanceliero scias estimi la engaĝadon de la esperantistoj favore al la disvastigo de lingvo komuna al ĉiuj popoloj. Kion koncernas la enkondukon de Esperanto kiel lingvon de la alcelita Eŭropa Unio, tio eble povus kontribui al tio por faciligi kelkajn ankoraŭ sur tiu vojo venkotajn malfacilaĵojn. Tamen estas malmulte realisme kredi, la Unuigita Eŭropo povus fariĝi la fandejo de lingvoj kaj kulturoj kiel USONO, en kiu pereas la naciaj lingvoj de ĝiaj membroŝtatoj.

Via timo, ke en unuigita Eŭropo la lingvoj de la aliaj membrolandoj povus esti malavantaĝigitaj kontraŭ la franca lingvo, estas senbaza. En la Eŭropa Komuno la lingvoj de la membroŝtatoj estas nepre rekonitaj kiel samvaloraj kaj samrajtaj.

Signita: Dr. Massion "

\*\*\*\*\*

## Lastmomenta informo

La intensivaj Esperanto-kursoj en Schweinfurt kaj Schwabmünchen pro manko de sufiĉaj interesuloj ne okazos. Tamen okazos la kurso en Paderborn.

## Profesoro D-ro Helmar Frank festprelegos

Paderborn (pp) Okaze de la malfermo de la Esperanto-intensivkurso en Paderborn, la 2an de januaro 1974, profesoro d-ro Helmar Frank festprelegos en publika kunveno. Li speciale klarigos siajn "tezojn pri la germana lingvopolitiko". (Vidu titolpaĝon!) La arango okazos en la granda konferencsalono de Gesamthochschule Paderborn, Fürstentweg 17. Komenciĝo je la 10,30 horo. Gastoj kaj interesuloj estas bonvenaj. Informojn donas Verband Deutscher Esperanto-Lehrer, 4972 Löhne 1, Bahnhofstr. 54 Sube: Lingvolaboratoria Esperanto-kurso en Münster



## Esperanto en universitatoj kaj altlernejoj

Darmstadt (rok) Post intensa agado en la Teknika Altlernejo fare de Eckerhart Woite kaj Franz Kruse per flugfolioj, afiŝoj kaj informtabulo anoncis sin 8 studentoj, kiuj volas lerni Esperanton. Kurso baldaŭ komenciĝos.

Saarbrücken (SEL) En la nun daŭranta vintra semestro en la universitato de Saarbrücken disvolviĝas du Esperanto-kursoj: unu por progresintoj kaj seminario pri la originala Esperanto-romano. Ambaŭ kursojn partoprenas po ok gestudentoj. - La kurso por progresintoj studigas la partoprenantojn je diversaj tekstoj: okazas tradukaj ekzercoj el kaj al Esperanto de literaturaj kaj ĉiutagaj tekstoj (ekz. el ĵurnaloj). La seminario okupiĝas pri la demando de literaturo de planlingvo, romantologio kaj selektitaj ekzemploj de la Esperanto-romano. Ĉiu partoprenanto ekzamenas unu romanon laŭ formala (struktura, rakontoteknika), enhava kaj lingva vidpunktoj. La rezultoj estas notitaj en seancaj protokoloj. Limigita kvanto estas havebla ĉe Sarlanda Esperanto-Ligo, Parkweg 14, D-6601 Scheidt.

Münster (ub) Nuntempe en la lingvolaboratorio de Overberg-Kolleg en Münster okazas Esperanto-kurso, kiun preparis Rudolf Fischer kunlabore kun la katolika kleriga institucio. La kurson gvidas Helmut Klünder kaj Ulrich Brandenburg, partoprenas regule 10 personoj. Unu el la celoj de kurso estas plilargigi la lokan bazon por la 30a IJK de TEJO, kiu okazos 1974 en Münster.

Paderborn (pp) Ĉe la Integra Altlernejo Paderborn fondiĝis Laborrondo por Esperanto kaj Interlingvistiko. Kunvenoj okazas regule ĉiun duan kaj kvaran lundon po monate, je la 18,15 h, dum la semestro. Gvidanto de la laborrondo estas d-ro Hans Kasselman, docento pri matematiko. Antaŭe okazis kelkaj informkunvenoj.

Novaj intensivaj kursoj. Jarfine okazos tri pliaj intensivaj Esperanto-kursoj en lingvolaboratorioj en Paderborn, Schweinfurt kaj Schwabmünchen.

\*\*\*\*\*

## Vortoj de esperantistoj

D-ro Antonio de Salvo, Romo: "Aŭskultado de esperantlingvaj elsendoj ne signifas aliĝo al la politikaj, ekonomiaj kaj socialaj principoj de la koncerna lando. Cetere, estas interese ekscii, ekzemple, kiom da esperantistoj legas "El Popola Ĉinio" pro simpatio al maŭismo, kaj kiom da ili legas ĝin nur pro scivolemo koncerne fremdan civilizojn, kaj pro la deziro ĝui altkvalitan lingvaĵon!" (Kuriero de Esperanto)

Jerzy Grum, Varsovio: "Mi estus hipokrita, se mi kontestus la fakton, ke bela ino elvokas en mi tujan emocion". (El hirtaj pensoj en Pola Esperantisto)

Aŭskultanto de Radio Roma: "Feliĉaj tiuj, kiuj parolas Esperanton!"  
Komento de la Esperanto-redaktoro de Radio Roma: "Tiaj varbsloganoj estas tute sensignifaj por la celoj de la Esperanto-programoj."

\*\*\*\*\*

## Radio Bervalio respondas....

D: Kio estas amaganto?

R: Amaganto estas bervalia profesio. Li produktas amuzon por la amuzantoj.

D: Ĉu jam ekzistas Komuna Verda Merkato (KOMUNVOMO)?

R: Ne jam ekzistas! Mankas la normigo de la produktiloj de la verdaĵoj.

## Salutojn al la esperantistoj en ĈSSR

Okaze de la subskribo de la traktado pri la normaligo de la rilatoj inter Ĉeĥoslovakio kaj FRG, fare de ĉefministro Strougal kaj kanceliero Willy Brandt, la 11 decembro 1973 en Prago, Pilo-Press salutas la esperantistojn en ĈSSR kaj esprimas la deziron pri bonaj kaj pli vastiĝantaj rilatoj inter la esperantistoj en ambaŭ landoj.

\*\*\*\*\*

### Alvoko al ĵurnalistoj-esperantistoj

Prago (pp) Oldřich Kníchal (Topolová 2916, CS-100 00 Prago), redaktoro de Práce, organo de ĉs. sindikatoj kaj redaktoro de Starto kaj Paco, alvokas la ĵurnalistojn-esperantistojn: interŝanĝi aktualajn informojn/artikolojn; establi skribajn kaj laŭeble personajn ligojn; interŝanĝi spertojn pri la ĵurnalisa agado pere de Esperanto kaj aliaj agadoj. Interesuloj skribu al la supre indikita adreso!

### Esperanto en televido kaj radio

La franclingva televido dum decembro dediĉis kvar elsendojn pri E-temoj.

Radiokurso de Esperanto komenciĝos en Finnlando la 2 februaro 1974

La aŭstra Televido nun preparas televidan elsendon pri Esperanto dum iu vespero en januaro aŭ februaro 1974. Detaloj sekvos!

\*\*\*\*\*

### La semajno en la radio

Varsovio Per informoj, komentoj Pola Radio memorigis pri la 3a datreveno de la subskribo de traktado pri la fundamentoj de la rilatoj inter Pollando kaj Federacia Respubliko Germanujo la 6an decembro. Je la sama dato la pola ministro pri eksteraj aferoj, Stefan Olszowski, restadis por labora vizito en Bonn. Laŭ eldiroj de ambaŭ flankoj la starpunktoj pri certaj temoj alproksimiĝis. Estas laŭ nia opinio jam bona signo por la evoluo de la normalaj rilatoj, ke tiaj vizitoj jam fariĝis kutimaj. Tamen kun granda intereso oni atendas la venontjaran viziton de Edward Gierek en Bonn. Oni povas supozi ke ĝis tiam la fondita laborkomisiono duflanka ankoraŭ pli multe alproksimigos la starpunktojn. Pri kio oni parolas en Pollando, tiu semajna rubriko priparolis la rezultojn de la balotoj al la naciaj konsilantaroj kaj la kunlaboradon inter Pollando kaj Jugoslavio okaze de oficiala jugoslavia ŝtatvizito. La Esperanto-Ekspreso konstatis la mankon de aktualaj informoj pri Esperanto-aferoj dum la pasinta tempo. Pilo-Press jam en sia antaŭa numero atentigis pri tiu fenomeno. La esperantistoj klopodas multe informi al la ekstera publiko, sed neglektas la internan informadon, kiu fakte estas la bazo por la ekstera informado.

Berne Claude Gacond finis siajn respondojn al la korespondantoj. La prononcado de fremdaj nomoj ankaŭ por li estas problemo. Malgranda atentigo Jerzy Uspienski ne plu estas prizorganto de la Esperanto-programo de Pola Radio, li nun laboras en la nacia programo. D-ro A. Baur parolis pri la arto, kiel ĝui la liberan tempon en recenzo pri libro kun la titolo "Laŭdo de la krea maldiligenteco".

Zagrebo Post la kutimaj novaĵoj el Jugoslavio oni legis artikolon pri amuzoj kaj belecoj de la vintra turismo en Jugoslavio. Novaĵo por esperantistoj: Sur du novaj ĵus eldonitaj jugoslaviaj poŝtmarkoj estas la portretoj de du esperantistoj!